Universala Esperanto-Asocio

AZIA AGADO KAJ PLIO

Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2015-15 sendita el Budapeŝto je la 30a de aprilo 2015*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## Pri strategio kaj kapabligo en orienta Azio

Meze de aprilo, la Prezidanto de UEA, Mark Fettes, oficvojaĝis en Ĉinio. En Ŝanhajo li partoprenis en la malfermo de Esperanto-centro en la Ŝanhaja Normala Universitato, kaj kunsidis kun anoj de Ŝanhaja E-Asocio en kunveno partoprenebla rete tra tuta Ĉinio. En Hangzhou, d-ro Fettes reprezentis nian Asocion ĉe la Konkurso de Mallongaj Filmoj pri Teo kaj Amo, organizita de Ĉina Radio Internacia, kaj kune kun estrarano LEE Jungkee gvidis unutagan Strategian Forumon pri Orientazia Movado. Duloke, d-ro Fettes faris prelegojn kun interpretado.

La universitato en Ŝanhajo konsentis malfermi Esperanto-kurson ekde la aŭtuno, kaj montris intereson pri la trejnado de kelkaj el ĝiaj instruistoj pri la lingvo. Kun la respondeculoj d-ro Fettes diskutis la kapabligajn bezonojn de la movado, inkluzive de pli avangardaj instrumetodoj por aziaj lernantoj.

La Strategia Forumo montriĝis trafa okazo por konatiĝo inter la korea, japana, mongola kaj ĉina movadoj. Ĉeestis gvidantoj de ĉiuj koncernaj asocioj. KAEM, Komisiono pri Azia E-Movado, reprezentiĝis per siaj vicprezidanto kaj sekretario, kiuj unuafoje povis ĉeeste kunsidi. Partoprenis ankaŭ ĉinaj estraranoj de ILEI (instruistoj) kaj IKEF (komercistoj), kiuj alportis valorajn perspektivojn sur siaj kampoj. Tiu nova modelo de regiona konsultado montras pripensindan vojon por aliaj mondopartoj.



Inter la prioritatoj en orienta Azio, troviĝas intensigo de kontaktoj kaj informfluo inter E-grupoj kaj unuopuloj tra la regiono; kapabligo de instruistoj kaj aliaj aktivuloj; kaj disvolvado de kulturaj interŝanĝoj kaj kunlaboro sur diversaj kampoj. La forumanoj ankaŭ konsentis pri tio, ke la junularo bezonas siajn proprajn aranĝojn kaj aktivaĵojn. Kvankam okazas progresoj pri tiuj punktoj, ekzistas multaj ankoraŭ ne elprovitaj ebloj. Strategia investado en tiuj prioritatoj, flanke de UEA kaj TEJO kune kun la landaj asocioj de Orienta Azio, povus porti la movadon al nova kvalita salto en la venontaj jaroj. Al tio kontribuos la 102a Universala Kongreso en Seulo (2017), kiun la UEA-estraro elektis super la forte konkurenca kanada urbo Montrealo nur kelkajn tagojn post la eventoj en Hangzhou.

### Partoprenantoj en la Strategia Forumo pri Orientazia Movado

Mark FETTES, prezidanto de UEA
LEE Jungkee, estrarano de UEA pri la Azia movado
HUANG Yinbao (Trezoro), konsiliano de UEA
INUMARU Fumio, vicprezidanto de KAEM,
Chimedtseren ENKHEE, sekretario de KAEM
NAN Yu Li, komisiito de Ĉina E-Ligo,
SUZUKI Keiichiro, prezidanto de Japana E-Instituto
LEE Young-koo, prezidanto de Korea E-Asocio
WANG Tianyi (Ĉielismo), prezidanto de IKEF,
GONG Xiaofeng (Arko), vicprezidanto de ILEI,
JOUNG Hyeon-ju (Natura), internacia estrarano de KEA
WANG Minhao, prezidanto de Ŝanhaja E-Asocio.

Aperos detala raporto en la junia numero de revuo *Esperanto*.

## Opinio: Izolitaj esperantistoj

Membro de nia asocio volas lanĉi transnacian E-grupon regionan. Por tio li petis datumojn pri la loĝlokoj de nia membraro. Trastudante proks. 120 datumerojn mi vidis ke:

- signifa proporcio ekzistas nur tie kie agad(et)as loka grupo, eĉ se malgranda kaj/aŭ "olduleca".
- ĉiu grupo havas ian ĉirkauaĵon de influo, do ankaŭ se la renkontiĝoj okazas 80 km for, ekzistas membroj.
- en lokoj sen grupoj la membronombro estas plejofte nula. Sed se ekinteresiĝas novulo, li post iom da tempo rezignas pro soleco. Post tio ekinteresiĝas alia novulo kaj... diabla cirklo.
- en 'solecaj lokoj' kelkfoje daŭre membras e-istoj, sed nur se ekzistas familia aŭ amikeca bando aŭ forta kunligo al UEA (delegiteco).

Al miaj konkludoj mankas scienca bazo, tamen mi opinias, ke ankaŭ en nia tempo de interretaj kontaktebloj (TTT nediskuteble estas la plej granda feliĉo por E-o) nepre necesas personaj kontaktebloj, grupetoj, regionaj renkontiĝoj kaj ne nur la interreto kaj internaciaj aranĝoj longe for de la ĉiutaga vivo kaj loĝloko.

La demando por Landa Asocio kiel estigi kaj subteni tiajn lokajn grupetojn kaj societojn; valorus pripensado, ĉar ŝajne nura interreta vivo esperantista ne sufiĉas.

Uwe Stecher, [uve ŝteĥer], Aŭstrio, Vieno; www.esperanto.at

*El la retlisto:< uea-membroj>, SMG iom koncizigis.*

## Germana Kongreso en fabela urbo

Jen invito al la germana Esperanto-kongreso dum pentekosto en Hameln, proks. 50 km okcidente de Hanovro. La urbo disponigas prezentofilmon pri la urbo - kun subtekstoj en Esperanto
http://www.hameln.de/tourismus/sehenswuerdigkeiten/filme/sagenhaftes-hameln-esperanto.htm

## Lingva Festivalo – longa tradicio en Rusio

La 18an de aprilo en la malnova Ruslanda urbo Kaluga okazis la 4a Lerneja Lingva Festivalo, kunorganizita de la Moskva Esperanta Asocio MASI kaj la urba Departemento pri edukado. Pli detale pri la festivalo rakontis Irina Gonĉarova en la novaĵretejo La Balta Ondo: http://sezonoj.ru/2015/04/masi-14/

## Landaj kaj Fakaj Asocioj respondis

Tra lastaj tagoj, la ritmo de respondoj al la enketilo pri 2014 pliboniĝis. Mi raportas nun kvankam restas trio da horoj ĝis la limdato, laŭ mia horzono. Novzelandanoj jam maltrafis la boaton; sed Usonanoj (pro Havajo) ĝuas tutan duontagon ankoraŭ. Respondoj alvenis kaj estis rimarkitaj (en proksimuma alvenordo): el VE – Venezuelo, BG – Bulgario, TJ – Taĝikio, AL – Albanio, NL – Nederlando, CA – Kanado, CH – Svislando, GB – Britio, IT – Italio, SE – Svedio, DK – Danlando, PL – Pollando, JP – Japanio, BR – Brazilo, SI – Slovenio, LU – Luksemburgo, FR – Francio, VN – Vjetnamio, NC – Nikaragvo kaj ES – Hispanio, do 20 landoj kaj landpartoj. Fakaj Asocioj iom postrestis, respondis (alfabete): bahaiistoj, ekologoj, etnismo, eŭropismo (EDE), juristoj, kolektantoj, kvakeroj, medicinistoj, sana vivo (Bruno Groning), skoltoj, spiritistoj (Lorenz), unu mondo, ŭonbudhismo. ILEI (instruistoj) ja sendis ampleksan raporton. Do, 14 respondoj. Rimarkeblaj, ke la religiecaj grupoj eksterproporcie reagis.

Se via FA aŭ LA ja respondis, kaj ne aperas en la listo, protestegu! Eblas ankoraŭ ensendi respondojn. La kompila laborego ekos en majo, sed longe daŭros – cento da horoj necesos. Ni komencos per LA; kaj volonte ricevos helpoproponojn por FA. Sekvajare, ni transiros al reteja solvo, kiel tiu delonge uzata en TEJO; tio estos pli komforta kaj por vi kaj por ni! Gratulon kaj dankon al ĉiu respondinto!



Foto el la premiado pri TEO kaj AMO.

## Vikia progreso

Kiel dumtempa solvo, la estraro ekuzis vikion de UEA por konigi almenaŭ bazajn faktojn pri la agado de la estraranoj, aktivuloj kaj partneroj. Trovu tion ĉe:

http://uea.org/vikio/index.php/Ĉefpaĝo

Pro intensa laboro tra la lasta semajno, la tuta sekcio pri Kapabligo (escepte de Terminologio) prezentas enhavon. Same, la paĝaro sub Komunumo pri la komunikado kun Landaj kaj Fakaj Asocioj nun prezentas la tekstan formon de ĉiu Estrara Komuniko (EKO); t.e. 53 en 2014 kaj 14 (ĝis nun) el 2015. Restas nur ĝisdatigi la indekson por aldoni komunikojn 8 ĝis 14 (aŭ 15!). La paĝaro pri Aktivula Maturigo (AMO) estas same kompleta – ĉiu temo enhavas ian tekston.

Se vi vidas ion riparindan en la prezento, ni petas vin tamen komuniki tion al mi prefere al provi rekte redakti tekstojn en la vikio. Antaŭdankon pro via kunlaboro!

Tuj kiam tempo permesos, ni serĉos alian pli potencan retejon por aperigi bildojn kaj elŝuteblajn dokumentojn.

## Promesoj, promesoj…

Mi promesas tuj kiam eble sendi al vi du pliajn komunikojn, pri la dua kaj tria tago de la estrarkunsidoj en Roterdamo antaŭ unu semajno. La tekstoj nun cirkulas inter partoprenintoj por komentoj kaj aprobo.

Vortoj: 1110

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.